# ATEISMO

ESPERANTO

Organo de ATEO

# ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO

Majo, 1989

Vol. 1, N-ro 3

Eldonita Trifoje Jare

# LA CELOJ DE ATEO

# ATEISTA TUTMONDA ESPERANTISTA-ORGANIZO

1. *Kunligi Esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.*

2. *Disvastigi Esperanton inter ateistoj.*

3. *Defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.*

4. *Instigi ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.*

5. *Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturan nivelon de Esperantujo.*

6. *Libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn kaj ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.*

7. *Malkateni la mensojn!*

# ENHAVO

**De la Vic-Prezidanto kaj Kun-Redaktoro** . . . . . . . . . . . 2
Kvar gravaj anoncoj

**Iomete Aliel Pri Ateismo Kaj Religiismo,** de Johano Elija . . . 3
Personaj travivaĵoj estas pli konvinkaj

**Kelkaj Malfacilaĵoj,** de Todd C. Moody . . . . . . . . . . . . 7
Li favoras ATEO-n, sed estas problemoj

**Fragmentoj de unu Letero al Leteramiko el Togo, Afriko** . 9
de Jozefo Kristian, el Ĉeĥoslovakio

**Religio Trudas - Junuloj ne Ludas,** de Pierre Savoie . . . . . 10
Kristanoj ne komprenas rolon-ludojn

**Nova Societo de Liberpensularo Fondita en GDR** . . . . . . . 13
Helmut Bein provizas bonajn novaĵojn

**La Kruela Postlasaĵo de Kristoforo Kolombo** . . . . . . . . . 14
Daniel Fogel demandas: "Kial estas Kolombo 'Amerikana Heroo'?"

**Ni Bezonas Novan Ateismon,** de O. Pavlov . . . . . . . . . . . 17
Interesa sekvaĵo al pli frua artikolo

**La Intervjuo kun Profesoro Giovanni Barterini** . . . . . . . . 19
Itala historiisto komentas pri la Pola katolika eklezio
de Andrzej Broda

**Religioj kaj Ideologioj en Europo,** de Volo Fjordano . . . . . 20
Raporto pri grava konferenco en Eŭropo

**Artikoloj, Kartunoj kaj Ŝercoj por Venontaj Numeroj** . . . . 20
La Estraro ĉiam bezonas iliajn

# De la Vic-Prezidanto kaj Kun-Redaktoro

## La estraro devas pligrandiĝi

La estraro nun konsistas nur Usonanoj. Tio estis akceptinda ĝis nun, ĉar ili fondis ATEO-n kaj ATEISMO-n. Tamen, tiu stato ne povas daŭri estonte.

Ni urĝe bezonas pluajn membrojn por la estraro el aliaj landoj. La plej taŭga rolo estus kiel Asociata Redaktoro, kiu helpus fari redaktorajn planojn kaj trovi verkistojn kaj artikolojn por ATEISMO. La ĉeestantoj ĉe la 1989 kunveno-ATEO je Brajtono elektus almenaŭ unu Asociatan Redaktoron el Eŭropo.

Se la posteno de Asociata Redaktoro de ATEO interesas vin, bonvolu skribi al Minerva Massen, kiu prezidos ĉe la Brajtono kunveno. Vidu eksteran dorsan kovrilon por ŝia adreso.

## Pri abonantoj de ATEISMO kaj membroj de ATEO

Brita leganto demandis: ĉu persono povas aboni ATEISMO-n sen aliĝo al ATEO? La respondo estas jene: ĉiuj abonantoj de ATEISMO estas, fakte, membroj de ATEO sen plua pago aŭ oficiala ago.

ATEO ekzistas eldoni ĝian revuon, ATEISMO, kaj kunigi ateistajn Esperantistojn per tiu eldonaĵo. Plue, unuj ateistaj Esperantistoj povas kunveni ĉe UEA Kongresoj, kaj aliaj povas kunveni en iliaj propraj landoj (vidu la lastan temon sube).

Necese, la abonantoj/membroj kiuj ĉeestas ĉiun ATEO-an kunvenon ĉe UEA Kongreso devas elekti membrojn de la Estraro, kiuj oficialas dum unu jaro.

## Pago de abonkosto por ATEISMO

**Ĉi tiu temo koncernas NUR legantojn de ATEISMO kiuj loĝas en PAGPOVAJ LANDOJ.**

Almenaŭ triono de niaj abonantoj loĝas en NE-pagpovaj landoj. ATEO urĝe bezonas enspezon de abonantoj el pagpovaj landoj por elspezoj de TUTAJ abonantoj.

**La plimulto de legantoj en pagpovaj landoj ĝis nun NE pagis iliajn abonkostojn!!** Ĉi tiu numero de ATEISMO estas la tria kiujn ili ricevis. Estas sufiĉa nombro por decidi ĉu oni deziras regule ricevi kaj legi ATEISMO-n.

Se "**P89**" aperas post via nomo sur la poŝtetikedo de la koverto en kiu ĉi tiu numero de ATEISMO alvenis, tiuokaze la Sekretario-Kasisto ricevis vian abonpagon. **Se "P89" ne aperas, ĉi tiu numero de ATEISMO estas la FINA kiun vi ricevos, KROM SE la S-K ricevos vian abonpagon antaŭ 1989-09-20.** Li poŝtekspedos numeron 1-4 baldaŭ post tiu dato.

## "Landlistoj" de abonantoj kiuj loĝas en la sama lando

Ĉi tiu ideo estis priskribita en ATEISMO 1-1, paĝo 20, kaj denove en ATEISMO 1-2, paĝo 7. La respondo estis malgranda. Tamen, kelkaj da abonantoj en Ĉeĥoslovakio kontaktas unu la alian, kaj unu abonanto en Pollando kaj alia en Hispanio deziras ricevi leterojn de samlandaj abonantoj. La Sekretario-Kasisto enmetas noton kun ĉi tiu numero de ATEISMO al ĉiu abonanto kiu loĝas en Ĉeĥoslovakio, Hispanio kaj Pollando.

## Iomete Aliel Pri Ateismo Kaj Religiismo

de Johano Elija,* el Ĉeĥoslovakio

Ĝekaraj, permesu al mi enkonduke ion rakonti el mia vivo. Naskiĝinte kiel orfo, edukis min simplaj ruranoj. La Dio de avino estis estaĵo ĉiam kaj ĉiunpunanta. La Dio de la avo estis estaĵo ĉionamanta Patro. La onklo estis milda homo, kiu kredis neniun Dion. La avino kredis Dion, sed por ŝi estis la religio ĉiam nur servo al aliaj homoj, helpo, amo. Ekstere la familio estis katolika, kiel la tuta homa ĉirkaŭaĵo. De tiuj influoj rezultis por mi neceso vidi en la religio moralon, veran, profundan, helpan kaj akcenti neceson de la **toleremo**. Vera religio estis do por mi NUR la amo de la homo al aliaj homoj, surteraj estaĵoj kaj al kosmo. Mi respektis la dogmaron, kulton kaj organizajn formojn de societo, sed mi ne sentis ilin kiel necesa parto de la homa moralo. Tiuj formoj disigas la homojn; ni bezonas tion, kio nin unuigas.

### Dum la milito

Dum la jaroj 1942-45 mi vivis en Germanio en la koncentrejo. Tie mi renkontis multe da fiaj kaj noblaj homoj. Iuj estis komunistoj, demokratoj, respublikanoj, monarkistoj, filozofoj, ideologoj, religianoj (mohamedanoj, kristanoj, budhistoj), ateistoj. Sed en la koncentrejo ne gravis, ĉu iu homo estas ateisto aŭ religiano, aŭ partiano de variaj tendencoj; gravis nur, ĉu vi donos al alia homo pecon da lasta pano, ĉu alia min spionos aŭ ĉu mi povas kredi lin. Surbaze de tiuj konkretaj spertoj kun alireligianoj mi ĉesis esti limigita katoliko. Mi fariĝis partiano de la religia ekumenismo, ne nur inter kristanoj, sed inter ĉiuj religianoj kaj finfine ankaŭ nereligianoj, kiuj sed serioze serĉas ĝustan vojon por vivi surtere en harmonio kun **ĉiuj**. Mi diris: mi ne havas malamikojn sed nur amikojn. Unuj diras al miaj planoj JES/jesamikoj/kaj NE-amikoj/kiuj diras NE/, sed ĉiam ambaŭ estas nur Amikoj. Kiu min kritikas, tiu tamen min helpas; eble, kiu nur konsentas povas noci, malhelpi min per sia nekritikemo. Bedaŭrinde plejparto da religianoj akcentis diferencojn kaj ne kio komunas, do dogmojn, kultojn ktp. Mi akcentis neceson ŝanĝi komune la mondon en pacan kaj frate vivantan kolektivon.

Ĉefe miaj samkredanoj, katolikoj plejparte fariĝis miaj malamikoj. En nomo de ilia Dio oni akcentis malamon. Malbona rezultato de la historia edukado eklezia. Mi ekkomprenis, ke por plejparto de eklezia ĉefaro estas la religia intrumento por politika, ekonomia kaj alia regado. Klaris por mi, ke ĉefe la ĉefoj neniam ekkomprenos la sencon de la amo, justeco. Nek la politikaj ideologoj komprenis tion pro ekonomiaj, politikaj kaj aliaj avantaĝoj, kiuj pligrandigas ilian potencon. Profunde homaj ideoj estis, estas kaj estos plejparte por la plimulto nur instrumento por sinjori sed ne por ŝanĝi la moralan kaj spiritan mondon EN SI.

### Post la milito

Reveninte hejmen post multaj konfrontadoj mi ĉesis esti religiano,

*Estas pseŭdonimo. Li pensas ke personaj travivaĵoj ĉiam pli konvinkas ol doktaj argumentoj kontraŭreligiaj.

kaj mi fariĝis batalanta ateisto. Mi pensis, ke post falo de la faŝismo venas tempo de vera socialismo kaj komunismo, kiu forigos kapitalismon kaj surtronigos la vere homan societon, kie perdos la homa egoismo siajn radikojn, kiuj estas la propra posedaĵo.

Laŭ mia kredo komunismo estas la mondordo, kiu volas mensogon, malsanon, mizeron, malbelon, maljustecon, militon ktp. anstataŭigi per vero, sano, riĉeco de ĉiuj, belo arta, justeco, paco, ktp. Sed la jaroj de la stalinismo montris al mi, ke mi kredis iluzie. S-ro. E. Raus [Red.: ATEISMO 1-1, p.6] tre optimisme pentris la situacion de la kredemuloj en socialismaj landoj. Oni agnoskas ekleziojn kiel politikajn fortojn, oni ne ŝatas la kontribuon de la eklizianoj kaj religianoj por morala plibonigo de la homoj (se tiuj tendencoj vere ekzistas); oni taksas la religiojn nur kiel politikan potencon, kiun oni povas uzi aŭ misuzi por siaj celoj.

## Hipokriteco

Suferas ateistoj en ekleziemaj landoj, suferas religiemaj homoj en ateisme orientitaj landoj socialismaj. Ie estas tiu suferado videbla, en komunismaj landoj oni publike proklamas la rajton kredi, sed oni limigas tiun rajton efektive kaj praktike. Se la gepatroj volas, ke iliaj infanoj vizitu instruadon religian, oni admonas la gepatrojn ne fari tion, ĉar la infanoj poste ne ricevos permeson studi gimnazion aŭ universitaton. Kaj vere, ili ne povas. Se la lernejestro havas en la lernejo pli da kredantaj infanoj, kiuj vizitas eklezion, oni ĉikanas ilin, kaj la lernejestro ne ricevos premiojn, ne estas laudata. Tiuj ĉi hipokritaj manieroj pleje koleigas la kredantojn, ĉar surpapere en konstitucio ili havas garantiojn, ke ili libere povas kredi tion kion ili volas; sed en praktiko kaj hipokrite, sekrete oni malfaciligas tion al ili. Se tiujn praktikojn ne vidas S-ro E. Diedrich [Red.: ATEISMO 1-1, P. 16] aŭ S-ro E. Raus, mi devas diri, ke ili malbone taksas la situacion, ĉar ili parolas oficiale. Ne morale, ne kulture kaj idee oni batalas kontraŭ eklezianoj kaj religianoj; sed monpune, perforte, organize, leĝe.

Kiel ateisto-humanisto mi devas protesti publike kontraŭ tiuj metodoj de ateisma agado. Se ni agas perforte, bone, vi devas diri: ni agas perforte pro tio kaj tio. Se oni persekutas iun religianon aŭ eklezianon, oni serĉas iam ĉe li la krimojn, ŝtelojn ktp.; kaj se ili ne ekzistas, oni elpensas tion. Tiuj metodoj de ateistoj estas falsaj kaj noĉas al nia ateisma agado. Komunistoj ne agas ĉiam nur morale, tion oni povas legi en sovetia presaro; oni ne agis tiel dum stalinisma periodo kaj nur nun ni devas atendi, ĉu perestrojko forigos tiujn hipokritajn metodojn aŭ ne. Tiuj kontraŭreligiaj metodoj produktas religiulojn, ĉar homoj serĉantaj justecon, ne povas tion toleri; kaj estinte mem la ateisto, mi devas protesti kontraŭ neĉastaj metodoj kontraŭreligiaj. Se la reĝimoj bezonas ekleziojn nur por fortigi sian potencon, nenio bona naskiĝas el tio, kaj la tendenco misuzi ekleziojn por siaj partiaj kaj ŝtataj planoj estas malbona metodo.

## Serĉanta homaro

Vere humanaj junaj homoj, serĉantaj pli ol materiajn bonojn, monon aŭ amuzon, vidas poste en la religioj ion spiritan, pli moralan ol

en ideologio ŝtata. Ĉiu konflikto inter nobla teorio ŝtata kaj praktiko nemorala produktas opozicion kontraŭ tiel agantaj ateistoj. Nature en landoj, kie regas eklezioj, naskiĝas la sama situacio, sed en senco mala. En socialismaj landoj la ŝtato ne volas ke ekzistu alia forto politika ol nur la partio, do ĝi vidas en eklezioj la politikan kontraŭulon, kiun oni devas neniigi. Sed ĉar la oficiala politiko ne estas ĉiam nur morala kaj agado de religianoj ne ĉiam nur nemorala, organiza perforto ŝtata produktas la simpatiojn por eklezioj. Tiel la ŝtato per forto igas la variajn ekleziojn agi ekumene. Tio neniam eblus sen tiu ŝtata premo. Krei unuecan fronton de ĉiuj eklezioj neniam oni povus sen tiu premo.

Interese kaj kontraŭ siaj interesoj agas ateistoj, kie ili sinjoras. Jes, se perestrojko ne restos nur vortsorĉado sed politiko vere liberalisma rilate al eklezioj, la vera kaj humanisma ateismo ricevos la spacon kaj oni povos limigi la influon de religianoj kaj eklezianoj per pure ideaj metodoj, kaj nur tio sencas en sfero de vera spirita kulturo. Premo de la partio kaj ŝtato en socialismaj landoj, ĉefe en Pollando, fortigas la ekleziulajn fortojn, ĉar la homoj vidas en eklezio nuran forton kiu defendas ilian liberecon spiritan. Do ankaŭ nereligiuloj vizitas la preĝejojn kaj aliajn similaĵojn nur por protesti kontraŭ la ŝtata premo. Forigante tiun premon oni fortigos la veran ateismon.

## Konvinkado

En landoj kapitalismaj oni plendas ke religioj kaj eklezioj persekutas la ateistojn, kaj vere tiel tio estas. Sed ĉiu premo ekster konvinkado nocas al ateismo kiel al religiismo. Kiu volas havi rapide kaj facile la efekton, produktas la kontraŭefekton aŭ nur ŝajnan sukceson.


Oni devas klare distingi inter religianoj kaj eklezianoj. Religianoj kiuj staras ekster la organizaĵo plejparte akcentas la moralan kaj etikan sencon de la religio. Tiuj homoj estas serĉantoj de la vero. Tiun ni povas kapti ne per ŝercoj kaj akra kritiko de la religio, sed nur pozitive, montrante al ili spiritajn profundojn de la filozofio, arto, ĉefe bela literaturo, scienco kaj homa saĝo. Ne forpreni la kredon kaj doni nenion, male, riĉigi tiujn homojn pri novaj valoroj spiritaj. Ankaŭ metodo montri al kredantoj de Biblio la aliajn sanktajn librojn de aliaj religioj estas bonega metodo ateisma. La variaj konceptoj de la Dio, variaj viv- kaj mond-konceptoj relativigas la propran starpunkton. Tion mi konstatis sur propra haŭto, kiam mi en Nazia Tria Regno povis konfronti mian kredon kun aliaj religioj. Mi poste serĉis eliron el konflikto en nova kredo, kiu jam havis laikulan karakteron. Ĉefe min kaptis la filozofio kaj poezio, kiuj anstataŭigis en mia animo kaj spirito la religion.

## Noblaj ideoj por noblaj celoj

Produkti malamon de la homo kontraŭ homo en nomo de la ateismo estas malbona metodo. Ni batalas pli kontraŭ ekleziuloj, kiuj serĉas en la religio apogon de sia potenco politika, kvankam ili ofte mem ne kredas Dion kaj liturgion ili komprenas nur kiel ceremoniojn. Ateistoj, unuiĝu por fari bonfartojn por la tuta homaro; plifortigu la kulturon, sanon, belon, veron, justecon, pacon, liberecon de la tuta mondo. Ateis-

toj, unuiĝu kun vere karakteraj religianoj de ĉiuj religioj de la mondo por tiuj ĉi celoj. Praktika kunlaboro sur kampoj supre cititaj surbaze de la toleremo reciproka povas esti la efika metodo, kiel nia humana ateismo povas konvinki pri niaj kvalitoj. Ni batalas nur kontraŭ malbonaj homoj, kiuj senzorge neniigas la naturon, misuzas teknikon por detrui la teron kaj organizi la neliberan mondon, kie unuj perfortas la aliajn en nomo de la noblaj idealoj aŭ de libereco aŭ de la materiaj bonoj. Do, kontraŭ ĉiuj misuzantoj de noblaj ideoj por nenoblaj celoj.

## Unua Premio:



La tutan aferon klare elvokas la ĉi-karikaturo de iu tutbelge oficiale premiita - Clément Harry/Klema Hari/ el urbo Turnhout, Flandrio.

En iun ajn landon alvenante, la Papa moŝto do nepre emas la grundon ŝmaci. Sed tie-ĉi, en Belgio: ĉu la kokan Valonan grundon? ĉu la leonan Flandran? ĉu ambaŭ? Kaj tiam, ĉu unue la "franclingvan" grundon? ĉu la unue la "nederlandlingvan"? (Des pli, ke ankaŭ estas kelke da Belgoj GERMANlingvaj!)

Gravege ja estis.

Nur dank al ... helikoptero la tutan aferon oni fakte (reale!) povis laŭetikete, diplomate kaj eĉ higiene finaranĝi: el la aerodromo rekte korloken de Bruselo tuj reekflugis la Sankta Patro.

Tiel nur unufoje kisi li devis, lekante tiam la plimalpli "dulingvan" grundon de l'tutbelga ĉefurbo.

Dankon al abonanto André Martin el Belgio.

## Kelkaj Malfacilaĵoj, de Todd C. Moody, el Usono

Estas sendube farinde starigi organizon kaj revuon kiuj celas vidi la mondon laŭ eksterreligia vidpunkto, kaj strebas kritiki la distordiĝojn kiuj rezultas de la religia vidpunkto. La apero de ATEO estas do por mi bonvena kaj subteninda.

Tamen, mi ne kredas ke iu ajn celo estas pli atingebla per konfuzoj aŭ manko de farendaj distingoj. Eble tiun sintenon mi ŝuldas al tio ke mi estas akademia filozofo. Ĉiukaze, mi trovas kelkajn malfacilaĵojn en la bazaj principoj kaj celoj de ATEO. Tiujn malfacilaĵojn mi pritraktas ĉi-sube.

### 1. *Ateismo kaj Religio*

Ateisto estas tiu, kiu ne kredas je iu dio. Ĉi tiu difino estas simpla kaj tute adekvata. Sed tiu fakto nepre ne implicas ke ateisto kontraŭstaras ĉiun ajn religion. Male, la ateisto eble apartenas al iu religio, ekzemple la Budhismo. Estas sciate ke la Budmismo ne postulas kredon je iu dio, kvankam ĝi ne malpermesas tian kredon. La fakto restas ke multaj Budhistoj estas ateistoj. Ĉu ATEO oponas iliajn kredojn, aŭ ne?

Ne temas nur pri la Budhisma religio. Ekziztas almenaŭ unu sekto de la Juda religio kiu ne estas teisma. Mi aludas al la nova, tiel nomata "rekonstruisma" sekto, fondita per Mordechai Kaplan. Li diris ke la nuntempa Juda religio ne plu bezonas "supernaturajn" kredojn. La bazo de ĉi tiu religio estas la Juda komunumo, kulturo kaj civilizacio. Ĉu ATEO konstraŭstaras tian Judismon?

Fakte, estas tre malfacile difini religion, aŭ filozofie aŭ sociologie (aŭ teologie!), ĉar la diversaj mondaj religioj estas tiom malsamaj. Por montri la profundon de tiu malfacileco, mi proponas ekzemplan difinon de religio:

> ***Religio*** = tiu kredo aŭ aro da kredoj laŭ kiu . .
>
> (a) ekzistas iu aspekto aŭ dimensio de la mondo kiu transcendas tiun kiun la sensado kaj pensado rivelas.
>
> (b) tiun aspekton aŭ dimension oni povas koni per iuj praktikoj (ekz., preĝado, meditado, rito).
>
> (c) tiu kono estas grava, havinda, kaj eĉ havenda.

Ni rimarku ke laŭ mi difino la religio diferencas de la fiziko nur je la propozicio (b); tio estas, nur koncerne la metodojn por malkaŝi la kaŝitajn ecojn de la universo.

Do, bone. Mia difino inkluzivas kelkajn ateismajn religiojn, ekzemple la Budhismon. Sed ĝi ekskluzivas la rekonstruisman Judismon, ŝajne.

La problemo estas tio, ke ni ne povas apartigi religion de la cetera kulturo. Estas falsa paŝo supozi ke iu ajn religio konsistas nur el kredo aŭ aro de kredoj. Konsideru kiom da Katolikoj restas Katolikoj, laŭ sia propra vidpunkto, eĉ kiam ili rifuzas la plimulton de la dogmoj kaj kredoj de tiu religio. Oni diras, "Nu, mi ne plu kredas je la papo, aŭ eĉ la Dio, sed mi ĉiam restos Katoliko." Oni iam ŝerce diris pri la ateisma filozofo Santayana, ke li kredas ke "Ne estas Dio, kaj Maria estas Lia patrino."

Religio estas tio, kion la filozofo Wittgenstein nomis "vivformo."[1]

1. Germane: *Lebensform*

La grava punkto pri vivoformo estas la fakto ke ĝi interplektiĝas kun aliaj vivoformoj, formante kompleksan reton de interdependoj. Ĝi ne estas izolebla. Laŭ ĉi tiu vidpunkto, estas naive supozi ke la religio estas aparta, disigebla fenomeno, kiun ni povas "kontraŭstari".

Tamen, estas grave--kiel mi jam diris--strebi vidi la mondon kaj la homan situacion sen la antaŭsupozoj de religiaj dogmaj. Sed estas erare supozi ke per tiu strebado oni "kontraŭstaras" religion, ĉar religio ne egalas la dogmoj aŭ kredoj.

## 2. *Materiismo*

Tiu filizofia termino ne estas tiom klara, kiom oni kutime supozas. Kion ĝi signifas? Eble ĝi estas la aserto, ke ĉiuj objektoj kaj procedoj en la universo estas ***materiaj*** objektoj kaj procedoj. Bone. Tamen kio igas objekton aŭ proceden "materia"? Oni povus respondi, "La materiaj objektoj kaj procedoj estas tiuj kiujn priskribas la leĝoj kaj principoj de fiziko." Ĉu la nuntempe sciataj leĝoj kaj principoj, aŭ estonta aro? Kompreneble, oni devas respondi ke temas pri iu estonta aro da leĝoj, ĉar oni ne volas aserti ke la scienca priskribo de la materia mondo estas jam kompleta.

Sed, ĉar ni ne scias la estontajn fizikajn leĝojn, nia materiismo estas iom vana. Simple dirite, la problemo ĉe materiismo estas jene: Se temas pri la nuntempe sciata fiziko, materiismo preskaŭ certe malveras; se temas pri iu estontece sciote fiziko, materiismo estas nur bagatele vera.

## 3. *Mistikismo*

Mistikismo ne egalas religion. Efektive, en la historio de religio okazis ofte konfliktoj inter mistikuloj kaj religiaj instancoj. Kelkajn mistikulojn la Katolika eklezio nomis herezuloj. Kio do estas mistikismo?

Mistikismo estas religio sen la eklezioj, instancoj, kaj institucioj. Ĝi estas praktiko, kiu celas alporti la praktikanton al ia profunda sperto de rilato al la universo. Cetere, mistikismo ne temas pri specifaj kredoj aŭ kredaroj. Temas pri praktiko kaj sperto.

Multaj sciencistoj estas ankaŭ mistikuloj. Estas, ekzemple, libro kies titolo estas ***Kvantumaj Demandoj: Mistikaj Skribaĵoj de la Gravaj Fizikistoj de la Mondo*** (redaktita far Ken Wilber). En tiu libro troviĝas eseoj far Werner Heisenberg, Erwin Schrodinger, Arthur Eddington, kaj similaj. Kompreneble, multaj sciencistoj ***ne*** estas mistikuloj. Tamen, ne estas evidente ke mistikismo estas danĝera aŭ iel kontraŭstarinda, krom se oni estas religia potenculo kiu timas la sendependecon de la mistikulo.

## 4. *Racio*

La karaktero de racio estas unu el la plej gravaj temoj de epistemologio. Sufiĉas diri ke ne ekzistas iu ajn konsento en la komunumo de filozofoj pri tiu karaktero. Tiu foresto de konsento ne pruvas ion ajn, sed ĝi implicas ke ni ne rajtas antaŭsupozi ke la racio mem favoras aŭ malfavoras iun filozofian vidpunkton.

Estas tente aserti ke tiuj, kiuj ne kongruas je nia kredo-sistemo estas neracia, aŭ eĉ malracia. Sed tiu aserto estas vana fanfarono.

Mi ne intencas implici ke neniu kredoj estas neraciaj. Esence, racia kredo estas tiu, kiu staras sur bonaj

kialoj, kaj ne ĉiuj kialoj estas bonaj. Tion dirite, oni devas agnoski ke nia koncepto de "bona kialo" estas parta kaj ne absoluta. Eblas ke kontraŭdiraj kredoj baziĝas sur bonaj kialoj, kvankam ne eblas ke ili ambaŭ veras.

Ĉu ĉiu religia kredo estas neracia? Kompreneble ne. Mi mem estas ateisto, sed la argumentoj por la ekzisto de Dio estas konataj al mi. Tiuj argumentoj estas, laŭ mia opinio, neĝustaj. Tiu neĝusteco tamen ne egalas neracion, kaj bonaj kialoj ne egalas absolute konkludigajn kialojn.

## 5. *Do Kio?*

Malgraŭ miaj kritikaj komentoj, mi ne kontraŭstaras tion, kion mi komprenas kiel la baza ideo de ATEO. Tio estas: Kvankam (laŭ mi) religio egalas nek teismon nek mistikismon nek neracion, ĝi tamen estas sendube la fonto de amaso da stulteco kaj krueleco de nia mondo. Religio havas multajn vizaĝojn, kaj kelkaj ili ne estas belaj. Sed la malamiko estas stulteco, ĉu ĝi estas en aŭ ekster religio.

# Fragmentoj de unu Letero al Leteramiko el Togo, Afriko

de Jozefo Kristian, el Ĉeĥoslovakio

El via interesa letero mi ankaŭ eksciis, ke vi estas katoliko, sed nuntempe vi ne havas precizan kredon kaj vi serĉas racian religion.

Grandaj vortoj, kara mia amiko Koffi! Mi gratulas, ĉar vi estas racie pensanta homo. Mi ne volas inciti niav scivolemon, sed kredu miajn vortojn: nenia religio estas la vero, nek kristanismo, nek ŝintoismo, nek buddhismo, nek alia; t.e. ne ekzistas racia religio.!!! Mi estas senkonfesia, t.e. ateisto. Mi kredas nek Jesuon Kriston, nek Budhon, nek alian dion. Dioj ne ekzistas, nur en mitologio! Kaj la mitologio aŭ la religio estas obskura demagogio! Cetere, kiel ne ekzistas Dio, tiel ne ekistas ankaŭ mirakloj, ne forgesu tion! Religiemaj homoj estas iom blinduloj kaj fanatikuloj, ja ili kredas ankaŭ en la transtomba vivo, sed ĝis nun neniu mortinto reviviĝis - krom laŭ kristana Biblio, nur Jesuo Kristo.

Vi estas klera homo, vi aŭskultas radiosendaĵojn, vi legas gazetojn kaj havas superrigardon pri diversaj aferoj okazintaj sur la tuta mondo.

Fanatikoloj-religianoj kaŭzis, kaŭzas kaj kaŭzos ĉie ajn en la mondo lokajn militojn, kiuj konsumas grandegajn kvantojn da mono; ekzemple: Iraka-Irana senracia milito, lokaj militoj en Suda Afriko, en Tibeto, Ĉinio, Malajzio, Ĉilio aŭ Nikaragvo, ktp. Sed kial? Ĉar la tieaj fanatike religiaj homoj lasis sin kondukiĝi per siaj nazoj helpe de militestroj kaj fabrikposedantoj.

Ĉiuminute estas elspezitaj miliardoj da mono por armado en la tuta mondo, kaj aliflanke en la Tria Mondo homoj suferas malsaton, la infana mortemo estas grandega - same en Brazilo, kiel el en Afriko. Sed mi ne volas mediti plue. Tial vi, kara amiko, ne serĉu "racian religion"; racia religio ne ekzistas, nur SINTROMPO! Vi kredu en si mem kaj vi estos feliĉa.

Atendante vian baldaŭan respondon, sincere vin salutas via malproksima amiko el Ĉeĥoslovakio.

# Religio Trudas - Junuloj ne Ludas

fare de Pierre Savoie [Pjer Savua], el Kanado*

Ni ĉiuj povas rakonti anekdotojn pri la efiko de religiaj grupoj en tielnomate "liberaj" societoj. Mi skribas de Kanado, kiu similas al Usono pro sia tradicio de "religia libereco kaj toleremo"--sed oni ne ofte pensas pri libereco ekster la religioj, bedaŭrinde.

Efektive, antaŭ kelkaj jaroj, en la kanada nacia himno oni ŝanĝis frazojn de la anglalingva versio. Ekzemple, pro seksa egalvaloro oni forigis la vorton "filoj". Sed ankaŭ oni ŝanĝis frazon kiu iĝis "Dio gardu nian landon". Tio ne nur konfuzas la popolojn kiuj dumvive kantis la malnovan version, sed ankaŭ la himno neniam menciis dion antaŭe. Ĉu tio estas progresema?

Religiaj organizoj influas la opiniojn de civitanoj. La apartigo de religio kaj ŝtato (se tio ekzistas en lando) estas iom fragila, ĝis punkto kie la organizoj povas subtile influi eĉ la registaron de "tolerema" lando.

Vi nun diras, "Ho, mi nun estas ateisto. Mi klare rimarkas tian subtilan influon en mia societo kaj povas ĝin rezisti." Sed ofte estas tre malfacile identigi la agadon de religiaj grupoj. Se iu ridinda "fundamentista kristana" grupo en Usono (la "animsavantoj" pere de televido!) deziras antaŭenigi iun aferon, ĉu ĝi vere agos en rekta maniero, kaj identigos sin klare? Ne, ĉar neniu aŭskultos ĝin, sciante la identon de la sekto aŭ kulto.

Anstataŭ tio, la membroj de la religio kaŝos sian religian membrecon. Ili ankaŭ devas kaŝi la motivon, pro kio ili subtenas iun aferon. Do, ili devas inventi aliajn motivojn (kiuj bone aspektas) kaj aliajn organizojn kiuj subtenas la aferon pro la ŝajnaj motivoj. (Tio ne estas unika taktiko de religioj; usona filozofo J. Pierpont Morgan [Ĝej Pirpont Morgen] rimarkis ke ĉiu homo disponas du motivojn kiam la homo deziras influi konatulon: la veran motivon kaj motivon kiu bone aspektas al la konatulo!) Religia grupo povas ankaŭ gajni monon pere de la ŝajniga grupo, sed uzi monon por la vera grupo religia.

La rezulto estas kaŝreligiaj grupoj kiuj povas influi registaron, ĵurnalistojn, policanojn, kaj eĉ ateistojn (kiuj ne konstatas la veran naturon de la religia grupo). Influo estas por iu ajn afero (konsiderante la ĥaosan, malracian naturon de religio), kaj kaŝreligio eĉ povas provoki ĝeneralajn atakojn kontraŭ senkulpaj grupoj.

Tio estas danĝero, ĉar pro tia sistemo, mi estas senkulpa viktimo. Tio iom kontribuis al mia decido ateistiĝi. Korespondanto kaj amiko en mia grupo estis preskaŭ mortigata de sia propra patro, kiu aŭskultis la religian kaŝgrupon.

Ĉu vi povas kredi ke kaŝreligio povas influi la tutan publikopinion kaj eĉ provoki murdon pro malracia motivo, en la plej "toleremaj" landoj? Ĉu vi kredus tion, se mi mencias ke pro kaŝreligiaj agadoj, mian grupon oni malprave konsideras "danĝera", "freneza", aŭ kiel "adoleska problemo" aŭ "sekreta kulto"?

* Pierre Savoie estas fondinto kaj prezidinto de la Klubo de Ludantoj de Rololudoj ĉe la Universitato de Toronto.

La plimulto da nordamerikanoj, eĉ nereligiaj, opinias tiel, kaj estas "pravigitaj" per televidprogramoj kaj novaĵoj. Eble ankaŭ vi, se vi aŭdis pri la afero, sed kompreneble ne pro la religiaj motivoj!

Mian grupon la "fundamentistoj" atakis tiel. Ĉu rasa grupo? Ĉu etna? Ĉu politika aŭ religia? Tute ne! Oni estas kontraŭ mi, kaj oni preskaŭ murdis mian amikon, ĉar ni estas nur ŝatantoj de distriĝa hobio!!

## Rolo-ludoj

Pro la multaj akuzoj, mi klarigas la aferon detale. Ni estas amatoroj de nova formo de tabulo-ludoj nomataj rolo-ludoj. Tiuj ludoj devenis el hobio de komplikaj ludoj; ekzemple: la amatoroj de "militludoj" (tio estas, ludoj en kiuj ludpecoj moviĝas sur tabulo kiu reprezentas batalkampon, per tre komplikaj reguloj de movado kaj batalado).

Sed tio ankoraŭ ne estas rololudoj. Estis iu militludisto, S-ro Gary Gygax [Geri Gajgeks] kiu komencis fabriki ludojn pri fikciaj lokoj de fantasta literaturo. Tiu "fantasto" similas al fabelaj rakontoj de la eŭropa mezepoko kun magio kaj monstroj, sed kun pli maturaj, evoluigitaj detaloj (kelkfoje oni kunligas ĝin kun scienc-fikcio).

Poste, Gygax proponis la ideon, ke oni ne konsideru ludpecon kiu reprezentas taĉmenton aŭ grupon da soldatoj, sed ke la pecoj reprezentu po unu soldato aŭ alia ulo. Ankaŭ li proponis ke tia ludpeco ne nur agu batalante sed ankaŭ agu per ĉiuj agoj, kiujn fantazia heroo faras en fantastoj rakontoj (esplorado, vojaĝado, magio ktp.).

Anstataŭ ordinara ludado, rololudo temas pri konversacio inter ludantoj kaj speciala ludanto, la ludmastro. La ludmastro estas verkinta iun "aventuron", kiu similas al manuskripto de fantasta rakonto. Sed ĝi estas skribita en ludan formon laŭ la reguloj de la rolo-ludo, kun statistikoj por la lokoj kaj monstroj kiujn la ludpecoj renkontus.

Poste, la ludantoj alvenas kaj komencas ludi. La ludantoj kunlaboras kaj decidas kion siaj ludpecoj (fikciuloj) faros en la situacio prezentita per la ludmastro. La ludmastro (sciante la faktojn pri la aventuro) decidas la rezultojn (helpe de reguloj kaj multeformaj ĵetkuboj) kaj demandas plian agadon de la ludantoj, kiuj respondas, ktp, ĝis iu sukcesa rezulto de la ludo. Ne estas iu ajn limo en rolo-ludo pri tipo de situacio aŭ daŭro de ludo, do ofte la ludo daŭras ĉiusemajne dum monatoj aŭ jaroj, kaj fantasta rakonto konstruiĝas laŭ epopea stilo.

Tiu ludo pli kaj pli vendiĝis, kaj nun estas en du versioj: "altgrada" versio kun 1700-paĝa regularo (la plej komplika ludo en la mondo), kaj enskatolita versio tradukita en ok lingvojn. Ĝi estas ludata de kvin aŭ ses milionoj da hobiistoj. Efektive, ĝi komencis tute novan hobion de pli ol 120 aliaj rolo-ludoj pri fantasto, scienc-fikcio, kaj aliaj temoj de fikcio. Pri tia ludo, mi verkis artikolon kiu aperis en la E-revuo MONATO (marto 1988). La ludo, ankoraŭ la plej ludata rolo-ludo, estis nomata "Dungeons & Dragons" [Kelkarceroj kaj Drakoj, aŭ "D&D" mallongige].

Ofte anglalingvano ne komprenas min, ĝis kiam mi mencias la magian frazeton "Dungeons & Dragons", kaj poste mia aŭskultanto mirinde ekscias ke tio estas "la danĝera ludo en kiu junuloj freneziĝas,

sinmortigas, ktp." Tute ne. Kiam rakontoj tiel parolis pri tiu ludo, la ŝatantoj de la ludo (kiuj multe nombras sed estas iom izolitaj inter si) surpriziĝis. Inter hobiistoj, mi unusole esploris la kaŭzojn de la disvastigitaj onidiroj.

La ĉefa propagandisto kontraŭ tiu ludo estas usono virino, Pat Pulling [Pet Puling], kies filo sinmortigis. La virino brile konkludis ke sola inter ĉiuj eblaj kaŭzoj de sinmortigo, la fakto ke la filo ludis la ludon estis la ĝusta! Ŝi sincere kredis tion, kaj komencis vojaĝi tra la tuta Usono por prelegi pri tio.

Fakte, ŝin influis antaŭa afero en kiu studento ĉe la Miĉigana Ŝtata Universitato malaperis en 1979. Iuj laŭte pensis ke malapero temis pri la ludo "Dungeons & Dragons", malgraŭ libro skribita de la detektivo William Dear [Ŭiljem Dir] kiu klarigis la verajn kaŭzojn (drogaĉojn kaj forportadon de samseksemula grupo.)

Post 1979, la temo de fantasta ludo interesis kristanajn predikistojn laŭdire "fundamentistajn", kiuj vortpentris la ludon "D&D" kiel okultan aferon el Satano! Ili petis multe da mono sur televido por venki tiun "minacon al la junuloj". Neniu kontraŭis ilin, ĉar neniu vidis la veran ludon! La predikistoj rakontis, ke por la ludo oni portas kostumojn kaj armilojn, ke estas sekreta kulto, ke oni freneziĝus kaj perdus la sencon de realeco, kaj aliajn stultaĵojn.

Tiuj rakontoj multe disvastiĝis, kaj organizoj estis kreitaj por kolekti monon por ankaŭ eĉ plua disvastigo. Estis jam multe da kaŝreligiaj grupoj sin okupantaj pri la "moralaj problemoj" de junuloj; do la ludo "D&D" estis aldonata al la temoj de tiuj grupoj. Tia temo multe sukcesis por tiuj grupoj, ĉar la grupoj estis subtenataj per televidaj novaĵoj pri similaj okazoj de sinmortigo. En mia urbo [Toronto], la katolikaj lernejoj malpermesis la ludon "D&D", malgraŭ la fakto, ke la solaj katolikaj pamfletoj kiuj kontraŭas tiun ludon estis verkitaj kun informoj el kontraŭ-katolikaj grupoj!!

Sed jen grava demando: ĉu la akuzoj kontraŭ la ludo kaŭzis disvastiĝon de rakontoj, aŭ ĉu rakontoj kaŭzis la akuzojn? Tiel rakontoj disvastiĝis, ke ludanto de "D&D" nepre sinmortigos, sed neniam oni donas pruvon. Fakte, eĉ se la rakontoj pravas, ke ĉiu el la 100 pretendoj de sinmortigo pro "D&D" dum dek jaroj estas veraj, tio indikus, ke la nivelo de sinmortigo inter la kvin miliono da ludantoj estas centono de la nacia nivelo por adoleskoj!

## La fino

La supra diskuto estas bona ekzemplo pri kaŝreligio. Neniu kredis la rakontojn de la originalaj predikistoj, sed kun ŝanĝo de motivoj oni nun povas influi la tutan popolon pri la samaj rakontoj, kaj gajni mondonacojn! Se iu grupo aŭ tendenco estas disvastigita kaj sencentrema, la grupo estas pli atakebla de la kaŝreligio. Kaj se iu tendenco estas trovata precipe inter junuloj, des pli atakebla!

Religiuloj en mia lando, ekzemple, kaŝreligie kondamnis abortadon en nia societo, kaj por allogi subtenon ili menciis la "grandan nombron" el la junulinoj kiuj trapasis abortojn. Sed, fakte, la plej grandaj procentoj da abortintaj junulinoj en Kanado estas la ciferoj por la provin-

coj, en kiuj loĝas la plej grandaj procentoj de "fundamentistaj kristanoj"!! Kompreneble, la kristana sinteno pri seksaj aferoj estas hipokrita kaj ne solvas la problemojn de sekso en la junularo, do jen la pli granda nombro de abortintinoj en "kristanaj" regionoj. Ĉu "problemo de adoleskoj", aŭ problemo de religio?

Mi esperas, ke ateistaj civitanoj en la "toleremaj" landoj ne tro opinios sin sekuraj kontraŭ entrudo religia. Religia influo ege ekzistas, sed en malsama formo ol la klasika. Kiel ĝin eviti? Evitu karitatajn organizojn kiuj aspektas pli politikaj ol karitataj, kaj petas monon por forigi iun "moralan" problemon. Evitu kunligitan organizon kiu inkluzivas religiajn grupojn (kion, do, la organizo promesis al la religio, por ke ĝi subtenu la organizon?)

Kaj laŭ mia opinio, evitu moralistajn grupojn kiuj pretendas ke ekzistas ankaŭ alia "nova" problemo en la junularo! En niaj landoj, la junulkulturo estas malfavore pentrita kiel la klasika triopo de sekso, drogo, kaj muziko "rok". Kontraŭe al la religiuloj, mi opinias ke la junularo estas nek pli nek malpli bona ol la antaŭaj generacioj. Eble la prizorgo de kelkaj grupoj ne estas sincera, sed kaŝreligiema. Ni pritraktu nur la verajn problemojn.

## Nova Societo de Liberpensularo Fondita en GDR

### Ekstraktita kaj tradukita el ĵurnalo *Neues Deutschland* de Helmut Bein, el GDR

Laborkomisiono pri Fondo de Asocio de Liberpensuloj de la GDR konstituciiĝis sin je vendredo, la 13-a de januaro 1989 en Berlin.

Al la komisiono apartenis 43 famaj personoj, inkluzive de natur- kaj socisciencanoj kaj medicinaj, pedagogiaj, kaj kulturaj laboristoj. Prof-o D-ro Helmut Klein de Universitato Humboldt elektiĝis prezidanto.

En la nomo de la kunvenintoj Prof-o Klein deklaris ke la asocio celas disvastigi sciencan, dialektikan materiisman mondkoncepton inter la popolo kaj atingi ĉiujn kiuj klopodas klerigi pri mondkonceptaj kaj etikaj demandoj el nereligia perspektivo.

La asocio intencas en kunlaboro kun aliaj sociaj asocioj pritrakti demandojn, ekz. senco de la vivo, la hombildo en socialismo, kaj paca sekureco, kun science argumentitaj vidpunktoj kaj optimisma vivteno.

Dum la vigla diskutado, oni unuanime konsentis ke la nova asocio devas fari vivhelpon, t.e., al la civitanoj per konsiloj kaj agoj helpi ĉe komplikaj kaj malfacilaj situacioj: malsano, soleco, maljuneco, morto de proksimuloj, funebraj servoj, konforme kun socialisma vivmaniero.

La asocio sekvas la progreseman tradicion de la liberpensula movado. Ĝi akceptas la principojn konstitucie garantiitajn pri libereco agi laŭ konscienco kaj kredo kaj pri disigo de ŝtato kaj eklezio.

---

Ĉiuj abonantoj de ATEISMO bonvenigas ĉi tiun novaĵon kaj deziras grandan sukceson al la nova societo! Ni esperos ricevi pli informon pri ĝia estonta agado.

# La Kruela Postlasaĵo de Kristoforo Kolombo

de Daniel Fogel, el Usono - tradukita de Minerva Massen

En 1992 ni solenos la kvincentjaran jubileon pri la "eltrovo" de Ameriko. La Usona Kongreso monprovizis jubilean komisionon por instigi verkaĵojn kaj publikajn paroladojn por soleni la datrevenon.

Kiel sentas pri ĉi tiu afero la indiĝenaj Amerikanoj--posteuloj de la tiel nomitaj indianoj, vivintaj kaj prosperintaj tra la okcidenta hemisfero, kiujn Kolombo kaj aliaj Eŭropanaj konkeruloj eltrovis tie?

Imagu kiel judoj, ciganoj, kaj slavoj sentus se iu solena festo estus organizita por noti la kvindekan datrevenon de la "eltrovo" far Hitlero de orienta Eŭropo en 1939.

Kio estis gajiga malkovro kaj kuraĝa altrudo por famo, rango, kaj riĉaĵo de la maristaj Eŭropanoj, por la indianoj estis senbrida atenco kontraŭ la propraj popoloj kaj kulturoj, kiu, plejparte, finis en sklavigado kaj genocido.

La unua hispana kolonieto fondita dum la vojaĝjaro 1492 de Kolombo troviĝis sur la insulo de Hispaniolo (nuntempe dividita inter la Dominikana Respubliko kaj Haitio). La indiĝena Aravaka popolo, kiu nombris je pli ol 300,000, vivtenis sin bone per kulturado de kasavo, terpomoj, arakidoj, kaj kapsikoj, kaj per retkaptado de fiŝoj kiuj abundis en marbordaj akvoj. Tamen la insulo estis malbenita de naturo per riĉaj orprovizoj malkovritaj de la Hispanoj en 1500.

## La Malbeno de Oro

Simple, por la indianoj oro estis ĉarmaj ornamaĵoj; sed por la Hispanaj aventuristoj, ĝi estis tutviva obsedo. Ili friponegis, rabis, kaj atakis la indianojn por kapti artaĵojn kaj religiajn objektojn, kiuj estis mulditaj kaj martelitaj el oro kaj arĝento de la indianaj artistoj. Kiam la indianaj provizoj de gemoj kaj valoraj metalaĵoj estis elĉerpitaj, la Hispanoj perforte pelis ilin en minejojn kaj perlajn fiŝkaptejojn. La indianaj viroj estis devigitaj fosi oron kaj plunĝi por perloj por la novevenantoj kaj ilia malproksima reĝo. Por ellaciga laboro sub malsanaj kondiĉoj, ili ricevis salajrojn kiuj estis nura porcieto por la Hispano, kaj tute senutila al la indiano.

"Estis multaj okazoj," skribis Bartolome de las Casas, "kiam Hispanulo vipus siajn indianajn fosistojn se ili ne ŝvitis, dirante, 'Kial vi ne ŝvitas, hundoj?' kaj la Hispana edzino agis sammaniere kontraŭ la indianinoj, kradinte kasavon, kaj per samaj vortoj......"

## Bartolome de las Casas

Las Casas, kies patro partoprenis en la dua vojaĝo de Kolombo, kaj gajnis riĉaĵojn per ekspluato de la indiana laboro en Hispaniolo, fariĝis la unua katolika pastro ordinita en Ameriko en 1512. Ankoraŭ Las Casas mem daŭrigis la posedadon de indianaj sklavoj sur sia riĉega bieno en Kubo. Kvankam li traktis siajn indianajn laboristojn pli bone meze ol la hispana koloniisto, sia konscienco ŝiriĝis pro la suferado kaj humiligo altrudita al la indiĝena popolo.

Iom da hispanaj dominikaj pastroj pasie denuncis la sklavposedadon de siaj propraj naciuloj sur Hispaniolo. Ĉi tiu influis la agon de Las

Casas, kaj li decidis liberigi siajn proprajn sklavojn en 1514. De tiu tempo ĝis la morto pli ol 50 jaroj poste, Las Casas fariĝis la plej energia kaj persistema pledanto por la indianaj rajtoj en la Hispana, kaj efektive, en la Eŭropa mondo.

## Du Respondoj al Genocido

Per siaj vervaj predikoj en la defendo de la indianoj, kaj per sia rifuzo doni la finajn sakramentojn al mortintaj koloniistoj se ili ne liberigis siajn indianajn sklavojn, Las Casas ankoraŭ ne sukcesis konvinki siajn samlandanojn ŝanĝi iliajn kutimojn. Ĉirkau 1520, la indiĝena popolo de Kubo malgrandiĝis proksimume 90% pro trolaborado, malsatigo, malsano, alsalto, kaj mortigo.

La Aravaka ĉefo Hatuej, kiu gvidis sian popolon en ilia kontraŭstaro al la Hispanoj, malestimege malkovris korbon plenitan per oro kaj diris, "Jen ilia Sinjoro, kiun ili servas kaj adoras.......Por li ili persekutas nin, por li ili mortigis niajn gepatrojn, tutan nian popolon kaj ĉiujn niajn najbarojn."

Sur sia humila mortlito en Hispanujo en 1506, Kolombo lamentis ke ses el sep indianoj de Hispaniolo mortis de mistraktado de post li forlasis la insulon. Tamen Kolombo, kiu fondis la sistemon mem kiu pelis la Karibeanojn al estingo, ne vidis la detruadon de indianaj vivoj kaj kulturoj kiel krimon kontraŭ homaro. Pliĝuste, li ploregis pri la perdo de mono al Hispanujo kaj ĝia krono kaŭzita de la koloniistoj per superfervora detruado de propra fonto de sklavlaboro.

Las Casas prenis radike alian vidpunkton. Enkondukinte sian argumentaron al la plej altaj niveloj de eklezio kaj ŝtato en Romo kaj Hispanujo, li insistis ke la hispana reĝo kaj la katolika papo metu finon al la sklavigo de indianoj. Malestimeginte la financajn interesojn de Hispanujo, Las Casas emfazis la homajn rajtojn de indianoj. La kaŭzo kial la kristanoj mortigis kaj detruis tiujn senlimajn nombrojn de personoj," li skribis en eldonaĵo de 1552, "estas ke ili motiviĝis per sia deziro por oro kaj sia deziro riĉigi sin dum tre mallonga tempo."

Las Casas konstatis ke la indianoj havis ĉiun rajton rifuzi la kristanan dion kiu estis trudata al ili per glavpinto. Antaŭ ol lia bruligo ĉe la fosto por la krimo de ribelado kontraŭ la hispanaj konkeruloj, al unu Aravaka indiano de Hispaniolo estis ofertita bapto de pastro, kiu tiel promesis al li enirigon en ĉielon. La indiano rifuzis, timante, ke en ĉielo, li povus trovi kristanojn kiel ĉi tiuj.

## Ĉu Pravigi La Konkeron Aŭ Defendi La Indianojn?

La starigitaj fortoj en la Hispana kortego kaj katolika hierarkio, kiuj profitis per la indiana sklava laboro, kontraŭstaris la kampanjon de Las Casas. Li devis partopreni en longaj teologiaj kaj filozofiaj debatoj kontraŭ tiuj kiuj opiniis ke la indianoj posedis nek rezonon nek animojn, kaj tial juste ili estis konkeritaj kaj sklavigitaj. La aristotela klerulo Juan Gines de Sepulveda, kiu neniam vizitis Amerikon, argumentis ke la indianoj "estas malsuperaj al la Hispanoj same kiel infanoj estas al plenkreskuloj, virinoj al viroj, kaj ja ..... kiel simioj estas al homoj."

Las Casas petegis al la Papo III por subteni sin en la debato. En 1537 la Papo eldonis papan buleon

deklarinte ke indianoj ja havas rezonon kaj animojn, tial ili estas egalaj al aliaj homoj kaj ili ne devas esti senigitaj je siaj libereco aŭ posedaĵoj, kaj ili estas pretaj ricevi la katolikan kredon kaj informon. La papa bilo estis, efektive, dutranĉa: Ĝi helpis Las Casas-n kaj aliajn humanajn pastrojn en iliaj luktoj liberigi la indianojn el sklaveco kaj milita atenco; samtempe, ĝi ebenigis la vojon por vastega kampanjo evangeliumi inter la Amerikanaj indianoj, subteninte la nepran superecon de katolika kredo super la propraj kredaj sistemoj kaj dioj de la indiĝenaj popoloj.

Ree al Hispanujo, La Casas agitis la Hispanan kortegon eldoni la Novajn Leĝojn de la Indioj en 1542. Ĉi tiuj leĝoj ne sufiĉe subtenis lian postulon por la senpera liberigo de ĉiuj indianoj tenitaj en sklaveco. Tamen ili fortigis leĝajn protektojn por indianoj en la Hispana imperio, kaj deklaris ke indianaj sklavoj estus liberigitaj je la morto de siaj posedantoj. Tiel teorie, indiana sklaveco estus finita post unu aŭ du Hispanaj generacioj.

## Klera Teorio Kontraŭ Sklaviga Kutimo

Praktike, ĉio elfariĝis malsame. Kiam Las Casas, kiu tiam havis sepdek jarojn, revenis al Ameriko efikigi la novajn leĝojn, li renkontis fortegan opozicion fare de la Hispanaj koloniistoj, inkluzive armitan ribelon kontraŭ la reĝo de Hispanujo per la konkeruloj en Peruo. La reĝo retiriĝis, restariginte al la sklavposedantoj iliajn rajtojn doni siajn bienojn (kaj sklavojn) al siaj heredantoj. Las Casas revenis al Hispanujo, kie li daŭris argumenti kaj skribi por indianaj homaj rajtoj ĝis sia morto.

Ĉio kion Las Casas kapablis atingi en sia vivo estis serio da leĝaj reformoj kiuj parte faciligis la stataĉon de indiĝenaj Amerikanoj, sklavigitaj kaj subpremitaj interne de Hispana empirio. Tamen la leĝaj rajtoj de la indianoj, kiuj ĝenerale havis nenian rajton de aliro al Hispanaj leĝlibroj aŭ advokatoj, ofte estis piedpremitaj de grandegaj bienuloj kaj senskrupulaj oficistoj de la eklezio kaj ŝtato.

## Kial Estas Kolombo "Amerikana Heroo"?

Estas interese mediti kial la anglosaksaj estroj de Usono, kiuj neniam estis fervoruloj pri la historio de la Hispana imperio, insistas pri la subteno kaj celebrado de la "eltrovo" de Ameriko far Kolombo por la Hispana krono. Post ĉio, Anglujo kaj Hispanujo batalis unu la alian por supereco de la Ameriko en la Karibeo, Florido, kaj en Eŭropo mem.

Kiam okazas la glorado de Eŭropa konkero de indianaj popoloj kaj rabaĵo de indianaj bienoj, malnovaj malamikoj kuntiriĝas. Estas notinde rememori ke Georgo Vaŝingtono, posedinto de Afrikaj sklavoj, ordonis siajn armeojn bruligi kaj ebenigi tiom da urbetoj de Irokvojaj indianoj dum la revolucia milito, ke la Irokvojoj moknomis Vaŝingtonon "La Detruisto de Urboj."

---

Daniel Fogel estas la autoro de la libro, ***Junipero Serra, the Vatican, and Enslavement Theology***, havebla en angla lingvo el: Ism Press, P.O. Box 12447-E, San Francisco, CA 94112, USA. Prezo: $9, plus $2 poŝtkosto ($5 poŝtkosto por transmara flugpoŝto).

## Ni Bezonas Novan Ateismon, de O. Pavlov, el Sovetio

Ateismiginte ŝtatnivele Sovetion dum lastaj sep jardekoj, somere de 1988 oni solene festis la 1000-jariĝon de akcepto de la kristanismo en Ruslando. Ĉu la ateismo malvenkis? Ne konkludu fuŝe!

Nia ŝtato dum la perestrojko turnas sin al la Homo, al la homaj vivo kaj konscio. Fine ni komprenis, ke socialismo signifas feliĉan Homon kaj ne nur materian bazon de komunismo. Turnante nin al la Homo, ni renkontiĝas kun multaj homaj problemoj, kun realaj nuntempaj sociaj moralo, etiko ktp. Kaj ni renkontiĝis kun la morala, etika rolo de la religio en la homara vivado. Ni devis pli atente rigardi la religion en Sovetio, ĝiajn respondojn al nuntempaj demandoj. Ni atente rigardas ankaŭ nian pasintecon dum perestrojka procezo, atente rigardi nian historion.

Ĉu oni povas studi la rusan historion sen la kristanismo? Sendube ne povas pro tio, ke la kristanismo en Ruslando evoluas kune kun nia rusa kulturo (alfabeto, eldonado de libroj, ikonpentroarto ktp.) Ekzemple, religiaj libroj, pentroarto estis la nuraj en Ruslando dum la X-XI jarcentoj. Alivorte, dum centoj da jaroj la kristanismo kaj kulturo nialande estis firme ligitaj. Oni provis priskribi rusan historion sen la kristanismo, sen ĝia progresa socia rolo, sed tio ne estis la vera rusa historio scienca.

Ĉu iu popolo povas normale ekzisti senhistorie, sen sia socia memoro? Ĉiu popolo bezonas sian historion, historion veran, aliokaze ĝi estus senmemora popolo. Tial turnante nin al nia vera historio, nunmomente ni turnas nin al la kristanismo, aŭ pli precize al ĝia historia rolo.

Plu, moralaj problemoj ekzistas tutmonde, ne nur en Sovetio. Kaj ĉu nekompatema ateisto estas pli bona ol kompatema kredulo? Ĉu ni, ateistoj ĉiuj estas kompatemaj? Kaj ekzemple, en Sovetio eklezio proponis la servadon de malsaneguloj en klinikoj helpe de kreduloj senpage.

Dirante hodiaŭ, "Dio ne ekzistas, do ne kredu je Dio", ni devas respondi al jena demando: "Kial la kredo je Dio estas malbona kaj ateismo estas nia nura vojo?" Oni ne devas forgesi, ke Dio estas koncentrujo de la plej bonaj homaj ecoj. Dio estas forta, saĝa, justa ktp. pro tio, ke la Homo mem estas malforta,. malsaĝa, maljusta ktp. Do, "batante" Dion ni samtempe "batas" kredulojn, alivorte homojn kredantajn aŭ la bonajn ecojn en la Homo. Ĉu ni pravas?

"Se vi pravas," bonege diris en ATEISMO 1-1 de Andreo Ŝalamon, "pruvu tion per vorto - ne per forto." Mi aldonus: "Pruvu tion ne per forta vorto aŭ Vortaĉo. Kolerego signifas malfortecon".

Laŭ mi, necesas eksplikí tion, ke ne Dio estas la plej grava danĝero por la Homo, sed la Homo mem, lia racia sklaveco. Homa sklava sinkonscio kreas Dion kaj la religion (ekz., rememoru la kondiĉojn de la kreado de la kristanismo), kaj la Homo tiumaniere trafas en la absurdan situacion. Serĉante sin mem, sian liberecon en la religio, la Homo ĉesas esti libera Homo. Ĝi fariĝas sklavo de Dio, dia sklavo, sed sklavo. La religio kreas la plej aĉan sklavecon - la racian.

Ĝis kiam la Homo deziras esti sklavo aŭ povas vivi ne konsciante sin mem kiel sklavo, ĝis tiam ni ne venkos la Religion.

Kaj ni komprenu, ke militanta rusa ateismo de la 20-30aj jaroj kaj simila nuna ateismo en iu ajn lando estas sensukcesa, senanima, erara ateismo, kaj ĝi ne povas ekzisti plu; ni ne ripetu erarojn.

Nuntempe, laŭ mi, ni ateistoj lernigu homojn estiĝi la Homoj, do oni devas ne nur religie, sed ankaŭ ekonomie, socie, politike liberigi la homojn. Nature, tio ĉi estas pli malfacile ol bati Dion, kiu ne ekzistas, tio ĉi estas malfacilega. Kion fari?

Kunveni kaj serĉi la vojon.

Por mi estas klare:

Ni bezonas humanisman ateismon, nian novan agadprogramon. Ĉi-rilate mi proponas preni kiel bazon de nova ateismo "Leĝojn por homaro" de Andreo Ŝalamon, pridiskuti ilin kaj ellabori nian novan ateisman agadmetodikon. Ĝi estu uzebla tutmonde.

Estu certa ke vi estas homo de Dio se vi portas ĝoje kaj silente la maljustecon.




Kartuno de Jaime Perich, kontribuita de J. A. Vergara el Ĉilio.

## La Intervjuo kun Profesoro Giovanni Barterini*

Fragmentoj elektis kaj tradukis de Andrzej Broda el Pollando

**Demando**: Kio estas via prognozo pri la estonteco de la rilatoj inter la Ŝtato kaj la eklezio en Pollando?

**Respondo**: Ne eblas konsideri la estontecon senkoncerne de la historio de la katolika eklezio en tiu lando. En la plej malfacilaj momentoj, ekzemple, kiam Pollando estis okupaciita de Rusujo, Prusujo kaj Aŭstrujo (en la 19-a jarcento), la eklezio ludis multajn, gravajn rolojn: la religian, la socian kaj la politikan. Kiel homo, kiu dediĉis multan tempon studi tiun ĉi historion, mi rimarkis same pozitivajn kiel negativajn sekvojn de tiu multeco de la roloj.

**Demando**: Ĉu la roloj kaj ties sekvoj ĝisdaŭris la hodiaŭan tempon?

**Respondo**: Kompreneble laŭ ŝanĝitaj formoj! Mi trovas pozitive la socian rolon, kies sekvoj rimarkeble konsolas polojn. Tamen, kune kun la pozitivaj trajtoj travivas ankaŭ la malavantaĝaj trajtoj: aŭtoritatemo, troa hierarkieco kaj iu speco de . . "antaŭkoncilieco". La limigitaj eblecoj de la sekularaj katolikoj asociiĝi favoras al prifirmiĝado de menciitaj trajtoj. La institucia eklezio en Pollando havas pli vestajn eblecojn interveni en la politikaj aferoj ol aliloke -- kaj tio devus esti la agadkampo de sekularaj kredantoj. Kiam la eklezio alprenas la taskon esti politika reprezentanto de sekularuloj, simple ĝi konstruas novan formon de sia regado super "la surteraj" demandoj.

> [Noto de A.B. - La projekto de la nova parlamenta leĝo pri asocioj kaj entute socia agado permesos pli ampleksan eblecon partopreni socipolitikan aktivecon de ĉiuj medioj en la pola socio.]

**Respondo** (kontinuo). Mi opinias, ke la pola religieco troviĝas nun en iu transira fazo; tio koncernas ĉiujn mediojn kaj ĉiujn generaciojn. Frapas min la sinmalkaŝo de religie indiferentaj sintenoj inter la junularo akompanataj de tre konsumisma vivvojo. La sintenoj de la juna pastraro: ties kritikemo kontraŭ la interneklezíaj tradicioj fortiĝas. La juna pastraro en Pollando - samkiel en okcidentaj Ŝtatoj - monstras pli kaj pli fortan emon al la sekulara vivo. La spertoj en Italio plej efike pruvas, kiel nova spiritstato de la pastraro modifas la sintenojn de la socio. Se tiuj novaj tendencoj, observataj inter katolikaj gejunuloj kaj juna pastraro, plifirmiĝos kaj koincidos, tiam ankau en Pollando - kiun oni opinias forta bastiono de la religieco - indikiĝos la ŝanĝoj rimarkataj hodiaŭ en Okcidento (tio estas: forlaso de la eklezio fare de pli kaj pli multaj socianoj aŭ almenaŭ malofta kaj neregula partopreno en la eklezia agado).

---

*Direktoro de la Instituto de Publika Juro ĉe la Universitato en Peruggia (Italio), la aŭtoro de la libro: "La socialisma ŝtato kaj la romkatolika eklezio en Pollando: Historio, politiko, juro." (La intervjuo estis aperigita en la semajnrevuo "Polityka" 52/1988).

## Religioj kaj Ideologioj en Eŭropo

de Volo Fjordano, el Jugoslavio/Aŭstralio

Inter 1988-12-27 kaj 1989-01-03, en la urbeto Traben-Trarbach, FRG, okazis la 32-a Internacia Seminario (IS) de la Germana Esperanto-Junularo. La ĉi-foja temo estis "Religioj kaj Ideologioj en Eŭropo" kaj la seminario allogis 240 partoprenantojn el 20 landoj.

Kiel ateisto mi ĝojis rimarkante, ke la partoprenantaro ne staris tiel forte sub la influo de religio kiel mi anticipis. Generale la etoson markis toleremo granda (eĉ troa, pro nesufiĉa kritikado unu de la alia). Kvankam multaj ĉeestantoj havas religiajn sentojn, mi rimarkis nenian fervoran arogantecon pro tio, kaj tute mankis fanfaronemaj ekleziuloj. Inter ĉiuj religiuloj pleje videblis kaj memfide agadis la Bahaanoj. (Ankaŭ en aliaj partoj de Esperantujo la Bahaanoj ŝajnas sufiĉe vigle agadi.)

Sen influo de iu ajn aparta ideologio, disdoniĝis ĝenerale amikeca vivĝojo. Babilado, festado, muzikado, ludado, ktp., allogis multan intereson. Junulara emo al malseriozeco certigis oftan malgrandan partoprenantaron ĉe pli formalaj aranĝoj. Laŭ mi, la plej interesa formala programero estis laborgrupo pri la temo "la burĝa religio," gvidata de Wim Koolhofen el Nederlando. Ĉiteme ni pritraktis la idearon ĉirkaŭantan kapitalismon. Tiu idearo estas bazita sur la unuaranga signifo donata al kapitalo kaj ĝia kreskado. La memfido de "kredantoj" kaj la ŝajne tuta interna memkompreneblеco de la idearo igas ĝin forte religieca.

Dum la IS mi malgrandskale disdonis ateisman literaturon Esperantan kaj germanan, sed pro manko de prepartempo mi ne prezentis ateisman referaĵon. Okazis nur unu ĉi-speca programero.

Kadre kaj fine de diskuto pri la demando "ĉu la vivo havas sencon?" konkretiĝis la ekagado de la prireligia (kaj parte porreligia) studrondo ASISTILO: Asocio de Studadoj Interreligiaj pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj. La interesuloj kun kiuj mi konatiĝis ŝajnas havi sufiĉe malferman kaj larĝspektran intereson pri ĉi-rilataj aferoj.

Entute, la IS ne nur konsistigis interesan semajnon sed montras ke la religia influo en junularaj rondoj ne egas, kvankam religiumas multaj Esperantistoj.

---

### Artikoloj, Kartunoj kaj Ŝercoj por Venontaj Numeroj

Evidente, ni bezonas kaj deziras artikolojn kontribuitajn de niaj legantoj kaj abonantoj, pri diversaj temoj rilate al ateismo, religio, kaj ŝtata-eklezia interrilato en via lando. Ni deziras taŭgajn kartunojn kaj ŝercojn. **Bonvolu sendi viajn kontribuojn baldaŭ!**

Ankaŭ, ni bonvenigos viajn leterojn pri ATEISMO, kaj ni penos respondi senprokraste.

**Vidu eksteran dorsan kovrilon por la estrara adreso!**

## Metodoj pri Jarpago de Abonkosto por 1989

**1. Pere de $8.00 US rekte al ATEO en Usono.** Se vi povas, bonvolu pagi pere de ĉeko aŭ poŝtmandato, pagenda al "ATEO", kaj poŝtekspedu ĝin al: John B. Massen, 855 La Playa--Apt. #458, San Francisco, CA 94121-3255, USA. Se vi ne povas pagi tiel, do pagu al UEA.

**2. Pere de UEA.** ATEO aranĝas kun UEA por ĝia abonservo, por kiu ATEO pagos al UEA procenton de la abonkosto. **Se vi povas pagi pere de UEA, jen instrukcio: pagu rekte al UEA la sumon de 16 guldenoj aŭ ekvivalento en aliaj formoj, pagebla al UEA, por ATEO konto "ATEO-Y" por "ATEISMO".**

2.1 Se vi havas poŝtbankan konton, pagu prefere rekte en la nederlandan poŝtbankkonton de UEA, numero 378964. Se ne,...

2.2 Vi povas pagi per internacia poŝtmandato. Sendu poŝtmandaton al UEA, Niewe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam ... NE al banko aŭ poŝtbanko.

2.3 Ankaŭ eblas pagi rekte en la bankkonton de UEA ĉe Bank Mees & Hope, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam, numero 25.52.89.804.

2.4 Aliaj ĝimedoj estas, ekzemple:

2.41 Ĉekoj aŭ eŭroĉekoj (ne forgesu meti la numeron de via karto sur la dorsan flankon de eŭroĉeko).

2.42 Monbiletoj (ne nepre devas esti guldenaj, dolaraj au forintaj - oni povas sendi per aliaj valutoj ekvivalentan sumon).

2.43 Internaciaj respondkuponoj. Valida internacia respondkupono valoras unu guldenon. Tia kupono validas nur se la stampo de la emisiinta poŝtoficejo estas sur la maldekstra parto; la dekstra parto estas por la akceptanta poŝtoficejo.

**Kiel ajn vi pagos, memoru ke, SE UEA simple ricevas monon - SEN iu mesaĝo, ĉu kun la pago aŭ ĉu per aparta letero - ili NE povos scii ke temas pri abono al "ATEO-Y" por "ATEISMO".**

**3. NE pagpovaj landoj.** Ni ne povas aranĝi metodon por pago. Tamen, ni sendos ATEISMO-n al ĉiuj kiuj petas ĝin.

**Se "P89" aperas post via nomo sur la koverto en kiu ĉi tiu numero alvenis, la Sekretario-Kasisto ricevis vian pagon por 1989.**

**Aliaj: BONVOLU PAGI LA ABONKOSTON TUJ, SE EBLE.**

## Peranto por Britio

Abonantoj en Britio povas pagi al Mark Palmer, kiu afable proponis servi kiel peranto por Britio. Bonvolu sendi pagon al: Mark Palmer, 28 Westfield Road, Caversham, Reading RG4 8HH, Great Britain.

**Ni Bezonas Perantojn de Aliaj Landoj**
**Bonvolu Proponi Vin Mem al Sekretario-Kasisto**

## La ESTRARO de ATEO
### Ateista Tutmonda Esperantisto-Organizo

**Ralph Dumain**, Prezidanto, Ĉef-Redaktoro, kaj Kun-Fondinto
1629 Columbia Road NW, Apt. 615, Washington, DC 20009, USA
Tel: 202 - 332-0589

**Minerva Massen**, Vic-Prezidanto, Kun-Redaktoro kaj Kun-Fondinto
855 La Playa #458, San Francisco, CA 94121-3255, USA
Tel: 415 - 668-7605

**John B. Massen**, Sekretario-Kasisto kaj Eldonisto
(Vidu supre por Minerva.)

**Manuskriptoj**

Ni bezonas kaj deziras artikolojn kontribuitajn de niaj legantoj kaj abonantoj, pri diversaj temoj rilate al ateismo, religio, kaj ŝtata-eklezia interrilato en multaj landoj.

Bonvolu sendi manuskriptojn al Minerva Massen, preferinde tajpitajn kaj kun duoblaj-spacitaj linioj. Konservu ĉe vi kopion de via manuskripto.

Aŭtoroj rajtas uzi pseŭdonimojn. Ni senhezite akceptos tradukojn el klasikaj aŭtoroj kie ne ekzistas kopirajta problemo. Pri kopirajthava materialo, provu gajni permeson de la aŭtoro aŭ eldonisto kaj sendu al ni kopion de la skribita permeso.

Ni NE akceptos porreligian propagandon por nia revuo.

**Korespondado kaj Informpetoj**

Vi rajtas kontakti iun ajn estraranon. Se vi anticipas ian ĝenon aŭ persekutadon pro ateisma agado, bonvolu mencii bezonatajn apartajn aranĝojn por vi. Se vi skribas permane, bonvolu skribe klare, aparte vian adreson.